## *La Sutro de la Esenco de la Praĵnja Paramito*

Kiam la bodisatvo Avalokiteŝvaro[1] sin-ekzercis profunde per la Praĵnja paramito[2], klare konis, ke la 5 komponantoj[3] estas ŝunjaj[4]. Kaj pro tio la bodisatvo povis savi sin de la sufero kaj malfeliĉo[5].

"Ŝariputra[6]! Korpo estas ŝunja[7], kvankam la esprimo estas alia, ŝunjo ne troviĝas for el korpo. Do, korpo egalas al ŝunjo[8], ŝunja estas korpo mem. Kromaj 4 komponantoj estas samaj[9]."

"Ŝariputra! Okaze de ĉiuj estaĵoj la ŝunjo estas ne naskiĝa nek estingiĝa, ne malpura nek pura kaj ne multiĝa nek malmultiĝa. En la ŝunjo ne troviĝas la 5 komponantoj, ne la 6 organoj[10], nek la 6 senteblaj fenomenoj[11]. Des pli ne troviĝas la 6 sensacoj[12]. Entute la 18 ingrediencoj tute ne troviĝas.

(Ankoraŭ pli, en la ŝunjo) La 12 kaŭzoj kaj motivoj[13] ne troviĝas. sed ili neniam finiĝas[14]. Ne troviĝas la 4 faktoj. La budha saĝo kaj ankaŭ budha virto ne troviĝas, ĉar en la ŝunjo) ne troviĝas profito nek honoro (en la darma mondo).

Ĉar bodisatvoj sinekzercis per la praĵnja paramito, ne havas obstinon en la koro. Pro tio ili ne havas timon en la koro. Foriginte la tutan inversajn penson[15] kaj revon[16], ili direktas sin al nirvano. La budhoj en la mondoj, pasinta, nuna kaj estonta, sinekzercas per la praĵnja paramito, povas akiri la plej altan bodion.

Pro tio La Sutro de la Esenco de la Praĵnja Paramito estas dia granda mantro, granda

---

[1] Avalokiteŝvaro;- Tiu ĉi bodisatvo ne estas historia homo.
[2] la praĵnja paramito;- unu el la 6 necesaj ekzercoj por budhiĝo.
[3] la 5 komponantoj;- la 5 faktoroj por konsisti homan korpon kaj koron. T.e. korpo, sento, distingo, formivo, sensaco.
[4] ŝunja;-io ne sentebla per homa sens-organoj, sed imagita io inter ekzisto kaj mal-ekzisto.
[5] Nirvano, bodio, klara koro, ver-vekiĝo signifas homan saviĝon kaj emacipiĝon.
[6] Ŝariputra;- servanto de Gotamo la Budha.
[7] Ŝunja;- ŝunj' radike ne estas substantiva, sed adjektiva.
[8] Ĉar ŝunjo ne estas apartigebla kun korpo, direblas, ke "korpo estas ŝunjo. Aŭdace dirite, ke ambaŭ estas en la rilato de objekto kun energio flanke de la relativeca teorio.
[9] Ĉar la homo estas konsistita de 5 elementoj, kaj ili estas ŝunjaj, ĉi tie ne troviĝas senŝanĝa memo (=atmano). Ĉiuj estas provizoraj kunmetaĵoj per la motiv-sekvo.
[10] la 6 organoj;- okulo, nazo, orelo, lango, haŭto, koro.
[11] la 6 senteblaj fenomenoj;- objekto, voĉo, odoro, gusto, tuŝo, imago.
[12] la 6 sensacoj;- percepti sentojn ricevitajn per la 6 organoj.
[13] la 12 motiv-sekvoj;- 12 etapoj de la homa estiĝo ĝis la morto.
[14] sed ili neniam finiĝas;- Homo naskiĝas per sufero, vivas en sufero, kaj mortas en sufero. Tio estas budhisma teorio.
[15] inversaj pensoj; - Eta deziro, ega kontento, altruismo k.t.p.
[16] inversaj revoj; - deziri socian rangon, bonhavon, honoron, renomon.

praĵnja mantro, la plej alta mantro kaj senkompareble alta mantro! Ĝi bone forigas ĉiujn suferojn. Tio estas vero, sed ne malvero.

Nun, mi diru la  mantron “gate gate pāragate pāra-saṃgate bodhi svāhā.”

Jen, la fino de La Sutro de la Esenco de la Praĵnja Paramito.